**Provenca Esperanto-Federacio**

kvaronjara gazeto
**127**
vintro 2021/2022

leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

**federacia retejo**
http://www.esperanto-provence.org
**nia federacio sur Facebook**
http://www.facebook.com/esperantoprovence

**prezidanto**
Pierre Oliva
Eden Park n° 99
2772 Montée du Vieux Camp
83330 Le Castellet
06 76 55 57 23
nlpolecamp@gmail.com

**aliĝkotizo (kun la gazeto)**
**6 €**
ĉeko al:
"Espéranto-Provence"
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto
Nicole Lafitte
(ĉe la supra adreso de
Pierre Oliva)

**sekretario**
**redaktoro kaj enpaĝiganto**
Pascal Vilain
48 avenue Alexis Godillot
83400 Hyères
06 42 19 68 51
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta n°**
**25-a de marto 2022**
bonvolu sendi al la supra retadreso
><><
antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

## Vorto de la redaktoro

Kutime, vi povas legi ĉi tie enkondukan teksteton de nia federacia prezidanto.
Bedaŭrinde, Pierre estis trafita de sanproblemo, pro kiu li pasigis kelkajn tagojn en malsanulejo, kaj plu restadas nun, kiam mi skribas ĉi vortojn, t. e. fine de decembro, en ripoz- kaj resaniĝejo.
Li pli kaj pli ree bone fartas kaj petis, ke mi salutu vin ĉiujn lianome kaj deziru al vi kiel eble plej agrablan novan jaron, malgraŭ la san-krizo, kiu ŝajne ne pretas forlasi nin.

*Pascal Vilain*




**Feliĉan Novan Jaron**
**al la membroj kaj apogantoj de nia federacio**

## enhavo


| | |
|---|---|
| 2 | raportoj morala, agada kaj financa pri 2021 |
| 4 | ĉu ankoraŭ okazas Eo-eventoj en nia regiono? |
| 5 | vidpunkte... KOVIM kaj Esperanto |
| 6 | Jutuba kanalo EsKu<br>Vojaĝemaj federacianoj |
| 7 | ZEO en Marseille (sekvo) |
| 8 | nekrologo<br>agendo |
| + | reta suplemento pri Reunio |

**Ne forgesu pagi la aliĝkotizon por la jaro 2022 - 6 € - al Espéranto-Provence**

ĉu pere de via loka asocio, ĉu rekte al nia kasisto, Nicole Lafitte

(aliĝilo aldonita al ĉi tiu gazeto)

**Dankon!**

***N'oubliez pas de payer la cotisation pour 2022 - 6 € - à Espéranto-Provence***

*soit par l'intermédiare de votre groupe local, soit directement à notre trésorière, Nicole Lafitte*

*(bulletin d'adhésion joint à ce journal)*

***Merci !***

---

## Federacia membro-kunveno / *Assemblée générale de la fédération*

Pro la sankrizo, nia membro-kunveno ne povis okazi en 2021,
kaj ni ankoraŭ ne scias kiam kaj kie ĝi (eble) okazos en 2022.
Ni prie informos vin, kiam eblos.
Jen ĉi-sube la moralan, agadan kaj financan raportojn pri la jaro 2021.

*En raison de la crise sanitaire, notre assemblée générale n'a pu avoir lieu en 2021,*
*et nous ne savons pas encore quand et où elle aura lieu (peut-être) en 2022.*
*Nous vous en informerons dès que possible.*
*Voici ci-dessous les rapports moral, d'activité et financier de l'année 2021.*

**********

## 1 - Morala raporto

***Pierre Oliva***

En mia antaŭa morala raporto (en via gazeto 123), mi konklude skribis: "Ni rapide forgesu la jaron 2020."
Bedaŭrinde, tute samis 2021! Duan fojon mi raportu pri jaro, dum kiu preskaŭ nenio okazis koncerne la Esperanto-agadon sine de nia Provenca federacio. La Mediteranea Esperanto-Semajno en Les Issambres estis nuligita en marto, same la novembra staĝo en Le Beausset.
Aldone al la fakto, ke maljuniĝas nia membraro, dum ne venas al ni novaj pli junaj fortoj, ankaŭ la nuna pandemio pligravigas kaj iel endanĝerigas la federacian situacion. Ni jam ne plu estas multnombraj, kaj jen aldoniĝis ŝtataj reguloj: masko, vakcinado, sana kaj nun vakcina pasporto. Se konsideri la fakton, ke pro nevakcinado kelkaj el ni ne plu povas partopreni en niaj kunvenoj, mi ne antaŭvidas rapidan kaj favoran evoluon kaj pli helan horizonton.
Espereble ĉi-suprajn diraĵojn mijan malkonfirmos mia morala raporto pri 2022, post unu jaro!

## 2 - Agadraporto

***Pascal Vilain***

**1 - Membraro**

Je la 31a de decembro 2021, Espéranto-Provence havis 97 membrojn (+15). Kial +15? Ĉar okazis multaj telefonalvokoj cele al rememorigo pri realiĝo.

**2 – Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj**

**2-1 deklaritaj asocioj**

**- kiuj plu ekzistas kaj aktivas**

13 - Marseille: 13 federaciaj membroj
ttt-ejo: http://esperanto.marseille.over-blog.com
83 - Fréjus / Saint-Raphaël: 18 federaciaj membroj
83 - Le Beausset: 10 federaciaj membroj
84 - Avignon: 3 federaciaj membroj

**- kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas**

04 - Manosque: 3 federaciaj membroj
05 - Gap: 2 federaciaj membroj
13 - La Roque-d'Anthéron
13 - Miramas

**2-2 antenaj grupoj de Espéranto-Provence**
13 - La Ciotat: 2 federaciaj membroj
83 - Hyères: 5 federaciaj membroj

**3 - Administrado**
**estraranoj (3):**
**prezidant**o: P. Oliva
**sekretario**: P. Vilain
**kasisto**: N. Lafitte
**aliaj komitatanoj** (6):
M. Arnaud, M. Gallardo, J. Moirand, T. Spanjaard,
R. Triolle, G. Wallez
**gazetrespondeculo**: P. Vilain
**retejrespondeculoj**: T. Spanjaard, P. Vilain
**reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France**:
P. Vilain (ĝis la membro-kunveno de Eo-Fr)
kaj T. Spanjaard (ekde ĝi)
**membrokunveno**: ne okazis pro la sankrizo.
**komitatkunsidoj**:
> junio 21 – La Ciotat (ĉe R. Triolle)
> aliaj prokrastitaj pro la sankrizo

**4 - Instruado**
> kursoj: en la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon
> staĝoj: MES kaj Le Beausset nuligitaj
> ekzamenoj: nuligitaj

**5 - Informado – komunikado**
> kiam eblis ĉijare, disdonado de Le Monde de l'espéranto (R. Triolle en La Ciotat kaj Marseille, R. Inaudi en sia regiono, P. Vilain en Hyères)
> kiam eblis ĉijare, en Marseille (Brasserie les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille), la 1an ĵaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo
> kiam eblis ĉijare, en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato: Lingva kafejo
> septembro – Avignon, La Ciotat, Marseille, Le Beausset, Saint-Raphaël: «Forumo de la asocioj»

**6 - klubaj eventoj**
> kiam ne eblis fizike kuniĝi, Espéranto-Marseille proponis dufoje monate retajn kunvenojn
> januaro - en La Ciotat kaj Marseille: hejmaj konversacioj + reĝkukaj festetoj
> januaro 27 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno
> julio 4 - Les Arcs-sur-Argens: pikniko de la klubo Fréjus/Saint-Raphaël

**7 - movadaj eventoj ekster Provenco kun partopreno de Provencaj federacianoj**
> majo 15 - rete: komitatkunsido kaj Ĝenerala membro-kunveno de Espéranto-France ; partoprenis parte P. Vilain (1a kunsido kaj membrokunsido) kaj parte T. Spanjaard (2a kunsido kaj membrokunsido)
> julio 3 - Sainte-Enimie (48): N. Lafitte kaj P. Oliva partoprenis en la Ĝenerala membro-kunveno de la asocio «Espéranto-Info».
> julio 3-9 - Kastelo Greziljono: 1a «Festivalo Naturist' por nova mondo» kaj 2a Verda Naturisma Semajno, organizita de La Kulturdomo kaj INOE - partoprenis pluraj membroj de Espéranto-Provence; gvidis kursojn por komencantoj T. Spanjaard.
> julio 23 / aŭgusto 2 – Kastelo Greziljono:
5a Maratona Esperanto-kurso - gvidis kurson R. Triolle
> julio 17-24: 2a Virtuala UEA-Kongreso - partoprenis pluraj Provencanoj
> aŭgusto 15-21 - Métabief (25): staĝo organizita de "Espéranto chalonnais" - partoprenis Josiane Moirand
> oktobro 2-9 - Templo del Sol (Hispanio): Restado en naturista centro organizita de INOE - partoprenis 5 Provencanoj
> oktobro 9 - rete: Aŭtuna Reta Festo de Espéranto-France - kontribuis T. Spanjaard per prezento de la Jutuba EsKu-kanalo
> oktobro 10 - Parizo: komitatkunsido de Espéranto-France - partoprenis T. Spanjaard
> oktobro 10 - Parizo: kunveno de FEI - partoprenis R. Triolle kaj P. Vilain
> oktobro 19-24 - Kastelo Greziljono
kantstaĝo "Interkant" - partoprenis N. Lafitte, P. Oliva kaj B. Bigonnet
> oktobro 25 / novembro 3 - Kastelo Greziljono
staĝo "Aŭtune" - partoprenis B. Bigonnet; vizitis tiam la kastelon M.R kaj P. Vilain
> novembro 5-7 - Torino (Italio): Internacia naturista naĝkonkurso - partoprenis 3 INOE-Provencanoj; gajnis medalon R. Inaudi kaj T. Spanjaard
> dum la tuta jaro, artikoloj de Provencanoj (R. Triolle, M. Gallardo, J. Grammatico, J.F. Cousineau, C. Carrey, P. Vilain) en la revuoj Monato, Le Monde de l'espéranto, Espéranto-info, La KancerKliniko, Literatura Foiro...
> tutjare: N. Lafitte kaj P. Vilain partoprenis en verkateliero iniciatita de A. Löwenstein
> tutjare: korektis J. Cousineau la revuon "Espéranto-Info" kaj P. Vilain "Le Monde de l'espéranto".
> kontribuo de P. Vilain en la redaktado de "Oklingva Proverbaro", verko iniciatita de P. Desmet (eld. FEL)

**8 - kulturaj kaj alispecaj eventoj**

> julio 21-25 - Berlino (Germanio): Fieru! 2021 - GLAT-a Esperanto-renkontiĝo - partoprenis T. Spanjaard

> oktobro - lanĉo de la nova Jutuba kanalo EsKu, iniciatita de T. Spanjaard kaj P. Vilain - jam aperis 6 filmetoj

> novembro 9-24 - Parizo: Ĝenerala Konferenco de UNESKO - nome de UEA partoprenis R. Triolle

**9 - diversaĵoj**

> junio/oktobro: A. Rémy bicikle vojaĝis tra Eŭropo.

**10 - venontaj okazaĵoj (neniu certeco)**

> februaro 26 - marto 5 - Les Issambres: Mediteranea Esperanto-Semajno 2022

> novembro 2022 - Kultura Semajnfino en Le Beausset

## 3 - Financa raporto

***Nicole Lafitte***

Bilan ESPERANTO PROVENCE au 31/12/2021

| RECETTES | | DEPENSES | |
|---|---|---|---|
| Côtisations : | 402,00 | Stage annulé (billets de trains) | 301,00 |
| Dons de 2020 omis | 11,90 | Frais de banque remb.trains) | 7,60 |
| Intérêts exceptionnels | 0,70 | Investissement chariot | 39,90 |
| Dons | 325,00 | Récup matériel Manosque | 67,80 |
| | | Gazette Espéranto Provence | 435,00 |
| Perte au 31/12/2021 : | 127,29 | Site internet | 15,59 |
| | 866,89 | | 866,89 |

Sur cc au 31/12/2021 : 1599,17
sur Livret au 31/12/2021 : 4622,21

La Trésoriére : Nicole LAFITTE

Le Président : Pierre OLIVA

## Ĉu ankoraŭ okazas Eo-eventoj en nia regiono?

Pro la pandemio, la Esperanta movado nur vivetas en la diversaj kluboj de nia Provenca federacio. La novembra staĝo en Le Beausset ne povis okazi. Nenio certas nun pri la okazigo de la Mediteranea Esperanto-Semajno fine de februaro. Pri tiu temo, vi povos legi sekvapaĝe tekston de Thierry Spanjaard.

Tamen okazis kelkaj renkontiĝoj, kiam eblis. Jen fotoj kaj raportetoj pri ili.



*merkredon, la 29an de decembro*

### Lingvaj kafejoj en Hyères

Eblis organizi preskaŭ ĉiujn monatajn renkontiĝojn en la hotelo IBIS de Hyères. Bedaŭrinde, kelkajn komencantojn ni ne plu revidis, aliaj sciigis, ke ili ne venos pro manko de vakcinado aŭ malŝato porti maskon. Plej ofte, venis do nura eta grupo. Ni tamen havis la viziton de viro, allogita de ĵurnala anonceto pri nia kunveno, kiu multe demandis pri la lingvo, la movado... Ni donis al li ĉiujn eblajn respondojn, dokumentojn.

"Ni semas kaj semas, neniam laciĝas..."

*raportis Pascal V.*

## Zamenhof-festo en Saint-Raphaël




Comme il est de tradition à la mi-décembre, les membres du Club Espéranto de Fréjus - Saint-Raphaël, rejoints par quelques amis de la région PACA, se sont retrouvés ce samedi 11 décembre près de la plaque «Rue Zamenhof», à Saint-Raphaël, pour rendre hommage à l'initiateur de la langue internationale qu'ils pratiquent avec plaisir et passion, l'espéranto.

Avant le repas convivial et l'après-midi récréative qui les attendaient, les participants, réunis autour de la présidente de l'association locale, Denise Loisel, ont pu écouter quelques mots prononcés par Jean-Claude Roget, qui leur a rappelé que le prochain Congrès Mondial se tiendra à Montréal, au Canada, l'été prochain.

*kopio de artikolo sendita al Var-Matin - raportis Monique P.*

## Vidpunkte...

***Thierry Spanjaard***

### Ĉu la KOVIM mortigas Esperanton?


La KOVIM-krizo komenciĝis antaŭ preskaŭ du jaroj. Se ni bone memoras, je ĝia komenco en Februaro – Marto 2020, ĉiu unue estis trafita de stuporo kaj nenio okazis dum la unuaj semajnoj de la tiama trudizoliĝo.

Post kelkaj semajnoj, la plej multnombraj adaptiĝis kaj ni igis niajn kutimajn kunvenojn esti retkunvenoj. Tio ne vere anstataŭis verajn kunvenojn sed ebligis al ni iel konservi nian interkomunikadon. Tiam, ĉiuj inter ni senpacienciĝis pri rekomenco de niaj kutimaj agadoj, kursoj, kunvenoj, staĝoj, ktp. Ekde la komenco de la krizo, la plejparto de ni esperis, ke vakcino povus esti rapide kreita kaj ke tiu sankrizo rapide finiĝos. Pli rapide ol ĉiam antaŭe, la tutmondaj laboratorioj laboris kaj kreis vakcinojn.

Tamen, ĉiam, kelkaj homoj plendas, ke la sankrizo estas inventita, ke la registaro ne plaĉas al ili, ke ili ne fidas la vakcinon, ke la vakcino estas kaŝita kontrolrimedo... kaj multe da aliaj fantaziaj komplotaj teorioj…

Kiam la franca registaro anoncis grandan vakcinkampanjon kaj poste la ekon de la sanpasporto, ni antaŭvidis esperon reveni al normala vivo… Ekde la printempo 2021, ni povis rekomenci interrenkontojn, kaj plani agadojn por Esperantaj kluboj, asocioj kaj aliaj strukturoj. Kompreneble, ĉar la vakcino ege malrapidigas la disvastiĝon de la malsano, estas normale, ke amasiĝo de homoj estas rezervita nur al tiuj, kiuj povas pruvi ĉu ke ili estis vakcinitaj, ĉu ke ili havas negativan teston, ĉu ke ili resaniĝis post KOVIM-malsano. Alie dirite, peto de sanpasporto por partopreni en renkontoj estas tute kohera.

Konkrete, en Esperanto Marsejlo, ekde Septembro 2021, ni povis restarigi niajn kutimajn agadojn, kiuj ĉefe estas ĉiusemajnaj kursoj kaj konversaciaj rondoj. Ĉi lastaj okazas en la Asocidomo kiu, same kiel ĉiuj renkontiĝejoj, petas ke ĉiuj partoprenantoj prezentu sian sanpasporton. En nia kutima konversacia rondo, duono de la partoprenantoj sekvas la komplotajn teoriojn kaj preferas vivi en izoliĝo ol sekvi sociajn regulojn. La rezulto estas, ke nia konversacia rondo ofte ne okazas kaŭze de manko de partoprenantoj, kaj tio endanĝerigas ĝian estontecon.



Mi demandas min, ĉu ĉie estas la esperantistaro, pli ol la ĝenerala loĝantaro, inklina sekvi komplotajn teoriojn... aŭ ĉu mi specife malbonŝancas en Marsejlo…

Sed, sen rigardo de la respondo al tiu demando, la nepartopreno en Esperantaj agadoj endanĝerigas la estontecon de niaj, jam malfortaj, kluboj kaj aliaj organizoj.

Se la Esperantaj organizoj malaperos, la risko estas, ke la movado kaj la lingvo sekvos la saman faton.

## Kun aŭ sen renkontiĝoj, federacianoj de Esperanto-Provenco tamen ne enuas, eĉ aktivas!
## Ĉu vi jam aŭdis aŭ legis pri la tutnova Jutuba EsKu-kanalo?


*Jen kiel Thierry Spanjaard prezentis la projekton okaze de la Aŭtuna Reta Festo de Espéranto-France, la 9an de oktobro:*

"**EsKu** estas mallongigo de Esperanto-Kulturo. La ideo pri tiu projekto venis de Pascal Vilain kaj mi, kaj fontas el konstato: nuntempe multe da homoj lernas Esperanton rete, ĉefe junuloj. Per retaj metodoj, ili bone lernas la lingvon, sed tute ne konscias pri la historio de Esperanto, ĝiaj movado kaj kulturo, ktp.

Ni do opiniis, ke ekzistas bezono konigi tiujn temojn, kaj la plej bona rimedo estas filmetoj. Tial ni kreis la Jutuban (YouTube) kanalon **EsKu**.

Estas du filmkategorioj: prelegetoj nelongaj, pli malpli dekminutaj, faritaj ĉefe de Pascal, pri diversaj aspektoj de nia lingvo kaj ĝia movado... kaj intervjuoj de gravuloj, verkistoj, homoj multe influantaj la Eo-movadon...

Nova filmeto estas publikigita ĉiun duan semajnon."




**Ne hezitu nek prokrastu: tuj abonu la EsKu-kanalon por spekti ĉiujn filmetojn! Por tion fari, iru ĉi tien,** aŭ kopiu la jenan ligon: https://www.youtube.com/channel/UCW9JemT1Xk8U1o73fuqKhEw

Vojaĝoj

## Vojaĝemaj (kaj laboremaj!) federacianoj....



oktobro 2-9 - Templo del Sol (Hispanio)
restado en naturista centro, organizita de INOE
sur la foto, de maldekstre dekstren
T. Spanjaard, R. Inaudi, M. Gallardo, ges-roj Cerisay



oktobro 19-24 - Kastelo Greziljono
kantstaĝo Interkant
partoprenis Nicole Lafitte, Pierre Oliva
kaj Bernard Bigonnet




< oktobro 27 - Kastelo Greziljono
Profitante restadon ĉe familianoj en Saumur,
Mari-Roza kaj Pascal Vilain vizitis la kastelon
dum okazis la staĝo "Aŭtuno".





novembro 5-7 - Torino (Italio): Internacia naturista naĝkonkurso - partoprenis por INOE Rosy Inaudi kaj Thierry Spanjaard, akompanataj de Marc Gallardo - gajnis medalojn Rosy (eĉ dufoje!) kaj Thierry



novembro 9-24 - Parizo
Ĝenerala Konferenco de UNESKO
nome de UEA partoprenis R. Triolle




Ĉu vi jam estas leganto de Unesko-Kuriero?
Se ne, sciu ke ĉiuj numeroj de la revuo estas libere elŝuteblaj.
Por tion fari, uzu la suban ligilon:
https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

## ZEO-oj en Regiono "SUD / PACA" > 12 - Marseille (13) - sekvo

*En la antaŭa gazeto n° 126, Thierry Spanjaard sciigis, ke malaperis ĉiuj stratplatoj en la Marsejla "strato D-ro Zamenhof". Li do skribis leterojn al la urbodomo de Marsejlo kaj al tiu de la nordaj kvartaloj.*
*Jen kopio de letero lia:*

"L'Espéranto, la langue internationale porteuse de valeurs de paix dans le monde et de respect de toutes les cultures, est célébré à Marseille, dans le 16ème arrondissement, par une rue au nom du Docteur Zamenhof, le créateur de l'Espéranto.
Aujourd'hui, le 15 décembre, date anniversaire de la naissance de Louis Lazare Zamenhof, je vous écris pour vous signaler que la rue du Docteur Zamenhof, si elle continue d'apparaître sur les plans de la ville, n'est plus visible sur le terrain car tous les panneaux de nom de rue ont disparu. Il serait urgent de les réinstaller, aux coins du boulevard Fenouil, aux coins de la rue Jean-Jacques Vernazza et au rond-point de la rue Rabelais et de la rue Emmanuel Eydoux, face au lycée professionnel l'Estaque. En réinstallant ces panneaux, la ville de Marseille rendra hommage à l'œuvre du Dr Zamenhof.

L'Espéranto est la langue internationale créée par Louis Lazare Zamenhof à la fin du XIXe siècle. L'existence même de l'Espéranto, langue universelle, neutre et équitable, est le symbole de valeurs de respect de toutes les cultures. En effet, le rôle de l'Espéranto est d'être une langue auxiliaire, facile à apprendre pour tous, de manière à faciliter le dialogue entre tous les humains, sans distinction d'origine ou de culture. Les valeurs de l'Espéranto sont tout à fait en phase avec celles portées par la mairie de Marseille.

Une fois les panneaux indicateurs de la rue du Docteur Zamenhof remis en place, je me tiens, ainsi que les autres membres d'Espéranto Marseille, à votre disposition pour une inauguration qui permettra de célébrer le grand homme ainsi que les actions de la Ville. Je me tiens également à votre disposition pour envisager tous axes de collaboration avec la Ville.

Je vous remercie par avance de m'informer des suites que vous donnerez à cette demande et vous prie d'agréer, Monsieur, l'expression de mes plus sincères salutations."

## Nekrologo



La 13-an de decembro 2021 forpasis en Toulon (83) **Janine Fréjaville**, iama prezidantino de la Tulona Esperanto-asocio.
Ŝi tie gvidis kursojn, kaj ofte partoprenis en staĝoj en Kvinpetalo (Bouresse).
Nevo ŝia decidis donaci al nia federacio ŝian Esperanto-bibliotekon.

Espéranto-Provence sincere kondolencas la familianojn de Janine.

## À noter sur votre agenda

*Dans les nos 121 à 126, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une nouvelle vague d'attaque virale accompagnée d'une période de restrictions de déplacement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.*

### dans notre fédération

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille**
Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes
4 square Stalingrad, 13001 Marseille
**dernier mercredi de chaque mois - 17 h - Hyères**
Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare
45 rue Edith Cavell (face à la gare)
**février 26 / mars 5 - Les Issambres**
MES - Semaine méditerranéenne d'espéranto
(à confirmer)

### en France

*pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs pour savoir si la programmation est maintenue.*

**Baugé (49) - Château de Grésillon**
**avril 1-5** - 73e congrès de l'Association française des cheminots pour l'espéranto (AFCE).
**avril 22-30** - 11e PRINTEMPaS : cours intensifs, conclus si vous le souhaitez par un examen international.
**mai 4-9** - Rencontre chorale d'Interkant et fête du 70e anniversaire de Grésillon.
http://gresillon.org/?lang=fr

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**
http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr
programme 2022 à venir

**mai 26-29 - Trélissac (près de Périgueux)**
Congrès national annuel d'Espéranto-France

### en Europe

**avril 11-18 - Brünswick (Allemagne)** - 38e semaine internationale du printemps. Rencontre internationale pour toute la famille, avec activités variées pour tous les âges,
https://psi.esperanto.de/eo/2022/
**avril 22-24 - Grande-Bretagne**. Congrès britannique à Llandudno Junction, station balnéaire du Pays de Galles.
https://britakongreso.org/
**mai 21 - Amsterdam (Pays-Bas)** - Congrès annuel d'Esperanto-Nederland
https://eventaservo.org/e/5f5fc5

### ailleurs dans le monde

**juillet 30 / août 5 - Moscou (Russie)** - 95e congrès de l'Association mondiale anationale SAT,
https://satesperanto.org/spip.php?article4947
**juillet 30 / août 6 - Québec (Canada)** - 55e congrès de la Ligue internationale des enseignants d'espéranto (ILEI)
https://2022.kongreso.org
**août 6-13 - Montréal (Canada)**
107ème Congrès universel d'UEA
https://esperanto2022.ca/fr/accueil

# Memore al L. Zamenhof

Por la unua fojo en Reunio ni festis la Zamenhofan tagon. Ventego kaj multkoloraj flirtantaj balonoj akompanis la renkontiĝon de 8 esperantistoj, en nia hejmo en Saint-Denis.

Dum ni trinkis friskan aperitivon kun antaŭmanĝetoj, unu samideano prezentis la alian. Tio estis instrua ekzerco por la komencantoj. Eĉ se ili ne komprenis ĉion, ili almenaŭ spertis la amikecan etoson, ili aŭdis nin paroli esperante kaj tiel ili konsciis ke nia bela internacia lingvo bone funkcias.

Post la manĝo ĉiuj estis plenaj je energio por ludi lernigan kvizon (ili malkovris la monon « stelo ») kaj por kunkanti esperantajn kanzonojn de Kajto, J. Yvart, ktp.

Ek al la venonta kunveno por piedirado, por vizito al muzeo, por ekzerci teatraĵon, ...????



kaj plezuro sano amo paco ĝuo sukcesoj feliĉo amuzo bonŝanco ekvilibro tenereco karesoj rido memfido

respekto poezio interŝanĝoj agrablaj spertoj verdaj steloj





# El Reunio ni deziras al vi plej bonan novan jaron kun multe da ĝojo







brakumoj kongresoj interkulturo pacienco amuzo mildeco volupto

malkovroj ekstazoj ravaj sonĝoj kundivido bonhumoro amikeco harmonio projektoj frenezaj ideoj pasio